# Vertikale

Trimonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

julio-aŭgusto 1992



la 18a estis panmanĝo sekvota de aŭkcio (vidu poste).
Per tiaj aktivaĵoj geinstruistoj ĉiam havas okazon bapti siajn gelernantojn en Esperantio per agrabla distraĵo.

**4.1.4 Aŭkcio** (6a junio)
Patrick Haerick aŭkciis Esperantajn malnovaĵojn kaj raraĵojn por havigi monon por la studotago „Mitoj kaj faktoj pri Esperanto". Estis bona okazo por ekkoni flankon de nia kulturo rigardante, kaj eventuale aĉetante je malalta prezo, parton de nia „arĥivo".

**4.2 Okazos**
**4.2.1 Fleja semajnfino** (26a-28a junio) en Eeklo.
Por novaj junaj kursfinintoj bona okazo por praktiki la lingvon kaj amuziĝi. Kuraĝigu viajn gelernantojn partopreni. Pliajn detalojn vi trovas Horizontal 1992,3.

**4.2.2 Studotago** : Mitoj kaj faktoj pri Esperanto (Gent, 5a sep 92)
Jacques Farjon de Lagatinerie, Pierre Janton kaj Claude Piron prelegados je la 5a de septembro en Gent.
Farjon estas jam konata en Belgio pro sia speciala aliro al kelkaj mitoj pri Zamenhof, la lingvo kaj la historio de Esperanto. Bedaŭrinde li ankoraŭ ne publikigis siajn ideojn kiuj tiel eble perdiĝos.
Janton estas profesoro en franca universitato. Li publikigis studon pri Esperanto en la populara franca libro-kolekto „Que sais-je?". Ĝi estas tradukita en Esperanto, kaj en la nederlanda, kun la titolo "Het Esperanto". Nepre leginda inform-fonto pri Esperanto por interesatoj kaj nepra por aktivuloj.
Piron estas la verkanto de facilaj tekstoj - romanoj, artikoloj en Kontakto, novelaroj. Lia lingvaĵo ne estas laŭ mia opinio tiel facila kiel iuj diras, kaj laŭ mia sperto liaj libroj ne estas uzeblaj por komencantoj. Kvankam li uzas malmulton da radikoj (400), li uzas tamen plenkreskajn sintakson kaj vortfaradon, kiuj fortimigas la legantojn. Mi rekomendus liajn librojn al progresantoj (kaj al instruantoj!). Lia eseo „La bona lingvo", kie li pledas pri pli regula vortuzado laŭ la internaj ebloj de Esperanto, provokis kaj grandajn laŭdojn kaj mallaŭdojn, tiujn lastajn pro la atakoj al la verkinto de Plena Ilustrita Vortaro, antaŭnelonge forpasinta Gaston Waringhien.
Do lege preparu vin kaj ĝuu la studotagon. (Enskribaj detaloj en Horizontaal 1992,3).

**4.3 Nova Pasporta Servo**
Nova Pasporta Servo (PS) jam estas preta. PS estas servo de la Esperanto-movado por Esperanto-parolantoj. Ĉiu kiu posedas propran ekzempleron de la adresaro de gastigantoj estas membro, kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastiĝon. La listo estas persona. Oni ne rajtas prunti sian liston al alia persono. Por ke la listo validu, ĝi devas havi la nomon de posedanto sur la kovrilo. Gastigado pere de PS ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormado en propra dormsako, ĝis rajto je utiligo de tuta domo. Kaj ne forgesu ke PS estas servo por Esperanto-parolantoj, do ĝiaj membroj devas scii Esperanton! En la ĉi-jara eldono troviĝas en Pasporta Servo preskaŭ 1000 adresoj en 60 landoj. Se vi informas pri Esperanto, montrado de Pasporta Servo estas grava atuto. Prezo : 357 BEF.

**4.4 Lerneja interŝanĝo** (Wolfgang Loose)
Max-Plank-Gymnasium
Ardeystr. 70-72



D-W-4600 Dortmund 1
serĉas ĝemelajn lernejojn en tuta Eŭropo. Ĝin frekventas gelernantoj inter 10 kaj 19 jaroj kun la celo parte studi.
Estas planita interŝanĝo kun 5-6 lernejoj tiel ke grupo de proksimume 20 gelernantoj loĝu ĉe gastiganta familio kaj interŝanĝe invitas la aliajn gelernantojn.
En la gimnazio Max-Planck ekzistas laborgrupo pri Esperanto. Interesitoj kontaktu :
Wolfgang Loose
Irisweg 12
D-W-4755 Holzwickede

## 5 Instruado

**5.1 Rapidaj kursoj en junio kaj septembro** (ah)
Por doni respondon al 70 informpetoj kiuj atingis la centron dum la lastaj monatoj, Geert Van Hecke, nia militserva rifuzanto, organizadas du apartajn kursojn por komencantoj dum 4 sabatoj posttagmeze junie kaj septembre en la antverpena E-domo. Instruisto estos Alex Humet, kiu aplikos la unuan parton de la Keefe-metodo. Pli da informoj petu de nia oficejo. Instruistoj kiuj volas vidi en praktiko la uzon de la Keefe-metodo estas kore bonvenaj.
Noto : La metode Keefe paroligas la gelernantojn ekde la unua momento per lertaj demandoj starigitaj de la samkursanoj mem. En tia kurso la kvanto de paroltempo por ĉiu kursano minimume duoblas, foje dekoblas, la tempon de tradicia kurso.

## 6 Informado

**6.1 Aŭstralia movado** (ah)
Jen ni trovis kelkajn faktojn pri Aŭstralio kaj ĝia movado en Informilo de E-Asocio de Estonio, kiu intervjuis s-ron Trevor Steele, prezidanton de Aŭstralia E-Asocio. Jen telegram-stile (kaj pensu pri nia imago de FEL) : „La Eo -movado en Aŭstralio certe ne estas amasa. Persvadi homojn de anglalingva lando izolita de ĉiuj fremdlingvaj popoloj, ke ili lernu Eon, estas malfacile. Aldona problemo estas, ke niaj anoj estas ĝenerale ne plu junaj, kaj junuloj malofte restas longe ĉe ni. ... Mi antaŭvidas ... ke estontece ni pli vigle agados en la Pacifika regiono, kie la valoro de Eo devus eĉ pli evidentiĝi ol en Eŭropo. Pensu pri la centoj da neparencaj lingvoj en orienta Azio, la Amerikaj, la Pacifikaj insuloj. ... Ekde la Dua Mondmilito kaj aparte ekde la 1960aj jaroj, kiam ĉesis la rasisma politiko de blanka Aŭstralio (nur eŭropanoj rajtis enmigri), Aŭstralio fariĝas unu el la plej multetnaj landoj. Abundas lingvoj sed nur la angla estas oficiala : ni neglektas la potencialon de tiuj lingvoj. Tamen alilingvaj enmigrintoj rajtas ricevi senpagan instruadon pri la angla kaj financan subtenon dum lernado : estas preskaŭ neeble vivi sukcese sen kono de la angla ... Ankoraŭ ekzistas grupoj da indiĝenoj, kiuj ne konas la anglan, sed ĝenerale ili volas, ke iliaj gefiloj lernu la regantan lingvon".
Aldona informo pri Trevor Steele estas ke li publikigis ĉe Fonto, Brazilo, Esperantan romanegon (eposon 500-paĝan) „Sed nur fragmento". Istvan Ertl, literaturisto kaj nuna redaktoro de revuo Esperanto de UEA, deklaris antaŭ nelonge okaze de prelego en la antverpena klubo la Verda Stelo, ke tiu libro estos mejloŝtono en la Esperanta literaturo, same kiel la versa eposo de W. Auld „Infana raso".

**6.2 Revuo : Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj** (ah)

S-ron Shen Chenru ni povis saluti dum la ĝis nun plej granda komerca aranĝo iam organizita de esperantistoj, la pasintjara eksponado en Oostende de cento da ĉinaj komercaj kompanioj.

Li estas la motoro de alia grandioza laboro, redaktado de la revuo Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj.

Dum jam 7 jaroj s-ro Shen pilotas tiun magazinon kiu en kvindeko da paĝoj (preskau A4-formato) kaj 4-foje jare raportas en Esperanto pri diversaj sciencoj. En la numero 1991,4 ni povas legi interalie (el dudeko da kontribuaĵoj) pri Polimarano - nova ekologia ŝipo, Nova metodo por prognizi tertremon, Alveno de aŭtomatigita oficeja inteligento, Ĉina akupunkturo en Meksikio aŭ Milda medicino en Francio.

Ĝis nun la artikoloj estis dulingvaj - ĉinaj-Esperantaj, sed ekde 1992 nur Esperantaj tekstoj aperos. Ĉinaj abonantoj ricevos suplementan kajeron kun la ĉinaj tekstoj (ankaŭ ne-ĉinoj povos ilin ricevi kontraŭ peto).

Prezo por trijara abono ĉe FEL: 684 fr.

**6.3 75 jaroj de la morto de Zamenhof** (Geert Vanhecke)

Je la 14a de aprilo 1917 mortis Ludwik Zamenhof. Kaŭze de tiu datreveno, mi verkis artikolon pri Zamenhof kaj Esperanto, kaj sendis ĝin al ses ĵurnaloj. Fine, kvar ĵurnaloj publikigis ĝin (Gazet van Antwerpen, Het Volk, Het Belang van Limburg kaj De Morgen). Mi ankaŭ kontaktis la BRTN-radion. Je la 8a de aprilo, "Moderne Tjiden", programo de Radio Donna, elsendis surbendigitan telefonintervjueton kun mi. Je la 11a de aprilo, la BRTN-monda servo elsendis surbendigitan intervjuon kun Emile Van Damme el la brusela grupo. Kaj je la 14a de Aprilo, mi estis intervjuita rekte por "Het Vrije Westen", programo de radio 1. La rezulto de tiu ĉi tuta kampanjo estas 25 informpetoj.

Noto : Geert estas nun konscienca militserva rifuzanto kiu prizorgos dum du jaroj la eksterajn kontaktojn de FEL dum lia servado en nia oficejo.

## 7 Varbado

**7.1 Kiom valoras adreso?** (Pieter Vets)

Se FEL volas pli kaj pli eniri la vojon de rekta merkatado (RM), ĝi kompreneble bezonas multe da adresoj. Ĝi ĝis nun jam vendis per poŝto abonojn al Monato kaj la memlernadpakedojn Esperanto Programita.

La centra ideo de rekta merkatado estas la elspezo de la promoci-buĝeto. Antstataŭ milionojn doni al TVa aŭ ekstera reklamo, oni sendas sian mesaĝon per poŝto, rekte al la celgrupo (kiun oni do certe atingas). Kompreneble dependas de la produkto (akvojn, aŭtojn,... t.e. ĝeneralajn konsumproduktojn oni vendas al ĉiuj, do disa ilo kiel TV sufiĉas) aŭ la komunikadcelo (ekz. diskonigo de la marknomo), sed en la lastaj jaroj la merkato de RM multe grandiĝis, specife en sektoroj de servoj kaj de inter-entreprenaj produktoj.

Laŭ mi FEL havas plurajn kialojn elekti la RM-direkton. Mi donas jen kelkajn: Plejunue ĝi fakte ne havas la elekton, ĉar mankas la rimedoj reklami pli grandskale. Due, ni ne havas produktojn (fake tio ĉiam ankaŭ signifas servojn) pretajn. Esperanto en si estas preskaŭ nevendebla produkto. Sed jes ni povas ĉiam krei adaptitan programon por iu specifa RM-kampanjo al iu specifa celgrupo. Laste, FEL posedas propran presejon, ĝihavas jam datumbazon kaj la ĉi-koncernan spertoscion pri komputiloj. Mi dum tri monatoj laboris ĉe firmao kiu reklamas per RM. Ĉu vi sciis ke por tiu ĉeno de vestajvendejoj la kostoj por akiri unu novan adreson en sian komputilon meze estis 2.000 fr. Kaj la valoro de adreso multobliĝas per (pro) ĉiu plia informo pri ĝi, ekz. aĝo, hobioj, nombro da infanoj, kiel ekkonis pri E- o,...

ALVOKO: Do, ekde nun nepre havigu la adresojn de konatoj aŭ eĉ nekonatoj al FEL kun kiom eble plej multe da krominformoj. Baldaŭ FEL distribuos tiucelajn plenig- slipojn al la lokaj grupoj kaj al individuoj. Mendu ĝin kaj tiam donacu milojn da frankoj.

**7.2 Kiuj junuloj ŝatas Torhout-Werchter-n, Sfinks-n aŭ kiun ajn alian festivalon** (PV)

El la iĝanta imago pri FEL aperas klare ke oni sentas efektive la junulojn kiel ege gravajn por la estonteco de FEL. Kaj kie oni trovas multegajn (120.000 da en T„W) junajn muzikamantojn ĉiujare. Flandrio havas mondfamon pro siaj festivaloj. Kaj ĉiam troviĝas budoj de GREENPEACE, AMNESTIO INTERNACIA, k.a. Oni vendas allogajn T-ĉemizojn, membrecojn, ktp.

Laŭ mi ni devas esti tie ankaŭ kaj kun junuloj. Ni devas cerbumi pri niaj ĉefmesaĝo kaj ofertaĵoj tie. Tiuj kiuj deĵoras bedaŭrinde ne povas eniri la festivalejon, sed kun bona grup-etoso, tio ne gravas. Aŭ eble eblas laŭvice eniri per la sama bileto, ĉu iu scias tion. (Laŭ mi oni metas stampon sur via mano kiam vi eliras). Aŭ eble ni povas interne deĵori, per movebla budo.

Kiu pensas same? Pri kiuj festivaloj vi pensas? Kiu pretas deĵori?

Tiuj kiuj interesiĝas kontaktu min pere de la FEL-adreso.

## 8 Dokumentado

**8.1 Manlibro por la aktivulo (ah)**

Revuo kia ĉi tiu kiun vi legas nun plenumas ian rolon, sed bedaŭrinde multaj el la informoj en ĝi publikigitaj perdiĝas kun la tempo, ĉar ni ne plu memoras kio aperis kiam kaj kie. Indekso tra la jaroj estas unu el la solvo por havi kompletan superrigardon. Alian solvon trovis jam antaŭ pluraj jaroj Marc Vandenbempt, el la grupo Esperanto 2000 en Leuven.

Marc ideis, konceptis realigis kaj ankoraŭ realigas la kompiladon de bazaj tekstoj daŭre uzeblaj de aktivulo. En vortoj de Marc : „La celo de tiu ĉi verko estas doni al la Esperanto-aktivuloj en nia regiono 'aktualan' superrigardon pri la movado en kiu ili laboras kaj pri la juraj kaj leĝaj eblecoj kaj devoj kiuj ilin ĉirkaŭas. Por atingi tiun aktualecon ni decidis pri verko kun apartaj folioj, kiun oni povas facile interŝanĝi".

La verko ampleksas jam milon da paĝoj, kun temoj kiel la diversaj Esperanto-organizaĵoj, la Esperanta-libromerkato, juraj aspektoj de la movado, agado kun subkampoj informado, instruado kaj uzado, por fini kun la diversaj servoj de FEL : revuoj, ekspozicia materialo, profesia helpo kaj biblioteko.

La verko kompreneble ne estas finita kaj espereble aldoniĝos kelkcentoj da paĝoj en la venontaj jaroj, signo ke la aktivuloj avidas al informiĝo, kaj ke restas kaj ekestas novaj informoj.

La verko estas abonata de kelkedo da kluboj kaj individuoj en Flandrio. Se en via grupo vi ankoraŭ ne posedas ĝin bonvolu peti prezentan pakaĵon al la oficejo de FEL.

FEL organizos du rapidajn Esperanto-kursojn, unu en junio kaj unu en septembro. La prezo estos 1500 fr. Invitilo jam estis dissendita de la centro al 850 informpetintoj. AH instruos mem laŭ la Keefe-metodo. Estos invititaj ankaŭ Esperanto-instruistoj por sperti la metodon. Ilia partopreno estos senpaga.

**2.4. Vertikale**
AH jam havas preta preskaŭ ĉiujn tekstojn por la unua numero. Ĝi estos trimonata revuo, havos la saman formaton kaj paĝdividon kiel *Horizontaal*, sed multe pli simplan enpaĝigon.

**2.5. Nia imago pri FEL**
Pro foresto de PV tiu ĉi punkto estas prokrastita ĝis la venonta kunsido.

**2.6. Prelegserioj**
La prelegvojaĝo de Krause okazos. AH serĉos novan respondeculon por kunordigi la aranĝon inter la diversaj grupoj de FEL.

**2.7. Antverpena festivalo**
En 1993 Antverpeno estos la „Kultura ĉefurbo de Eŭropo". Ivo Durwael proponas ĉi-okaze organizi en Antverpeno iun Esperanto-festivalon, kiu ne estus aparta kongreso, sed partoprenigo de la esperantistoj en la oficiala programo de la urbo. La urba servo por turismo jam pozitive esprimis sin pri la iniciato kaj pretas helpi. La estraro entuziasmas pri la propono kaj akceptas la koncepton de ID. Li ricevas de la estraro „blankan karton". ID mem kreu specialan laborgrupon. La plena gajno, sed eventuale ankaŭ la plena deficito, estos por FEL, kondiĉe ke ID liveru buĝeton kiu estas en ekvilibro. ID rajtas rekte trakti kun PP kaj GJ pri farendaĵoj de la centro. La spezoj iru tra FEL, tiel ke la centro aŭtomate povas kompari ilin al la buĝeto.

**2.8. Antaŭa protokolo**
Ivo Durwael petas aldoni al la protokolo pri 1992 03 21 en punkto 1.2.2.: *Poste AH petis al ID ne plu okupiĝi pri la dungitoj en la centro.* AH komentas, ke certe temas pri miskompreno. Li petis al ID ne plu okupiĝi pri la militrifuzanto, sed neniel pri la dungitoj. Li deziras mem, kiel prezidanto, havi kontrolon super la laboroj de Geert Vanhecke.

**2.9. Multjara investplano**
RR prezentis multjaran investplanon al la estraro. PP kaj GJ jam donis sian komentojn, kaj tiuj de la estraranoj estas nun atendataj. RR verkos koncizigon kaj sendos ĝin al la centro por aperigo en *Vertikale.*

**2.10. Membrokampanjo**
173 membroj ne rekotizis. AH redaktos kun PV leteron kiu iru tuj al tiuj 173 personoj.

**2.11. Financoj**
PP rakontas al la pleno pri la laboroj de la komisiono pri financo (vd. punkton 1.1.). AH volas kun PV priparoli la punktojn kaj eventuale verki varbleterojn.

**2.12. Venonta kunsido**
La venonta estrarkunsido estos tiu de la 19a de junio.■



# VERAJ ARGUMENTOJ

## KONTRAŬ ESPERANTON

Mi jus relegis *Don Quijote* kaj mi pensas, ke ni estas, ankaŭ ni, batalantaj kontraŭ ventomuelilojn. Ĉiuj ja scias, niaj malamikoj eĉ pli bone ol aliaj, ke Esperanto estas lingvo kompleta, belsona, facila per kiu ĉion, absolute ĉion, oni povas esprimi. Ni ĉesu do vanan batalon sur tereno elektita de malamiko. Jes ja, mi diris 'malamiko', ĉar ni havas verajn malamikojn. Se ilin ni ne havus jam ĉiu loĝanto de ĉi tiu kota bulo scipovus la internacian. Sed niaj malamikoj ne estas tiuj, kontraŭ kiujn ni argumentadas, propagandadas. Niaj veraj malamikoj ne estas histeriaj edzinoj, kiuj preferus, ke siaj edzoj zorgu pri 'seriozaj aferoj', anstataŭ perdi tempon kaj monon pro stulta utopiaĵo; ili estus malamikoj de io ajn, kiu transiras la limojn de iliaj egoismoj de inetoj. Niaj veraj malamikoj ne estas universitataj profesoretoj, kiuj senĉese demonstradas, ke ne povas funkcii pro manko de popolo, kulturo, tradicio, tio, kio de cent kvar jaroj jam reale kaj bone funkciadas; ili nur esprimas siajn suferojn pro la konscio, ke iliaj etanimaj bugradoj de kulturaj muŝetoj universitataj senvaloriĝus, se sen la mekanika ellernado de lingvoj mortaj kaj vivantaj, talentaj homoj rajtus aliri veran kulturon; ili estus malamikoj de io ajn, kiu minacus iliajn ŝvite akiritajn privilegiojn. Niaj veraj malamikoj ne estas dikventraj, kalvaj porkonegocistoj, kiuj ne komprenas, ke oni povu interesiĝi pri aferoj transpasantaj la porkonegocadon; ili estus malamikoj de io ajn, kio ne similas al ili. Kiuj do estas veraj malamikoj?

Ili estas tre simpatiaj, alte kleraj homoj, kiuj havas 'ŝtatresponsojn', kaj kiuj konas la verajn argumentojn kontraŭ Esperanton, samkiel ili scias, ke neniam oni rajtas ilin publike eldiri. Ili 'komprenas' nin kaj bedaŭras, ke la harda realo malhelpas nian 'laŭdindan' idealismon, kaj en la sekreto de siaj kabinetoj delegadas kontraŭ nin arogantajn etulojn, Blinkenberg-ojn[1], armitajn per rustintaj argumentoj, pri kiuj ili mem ridas private, sed kiujn ili aŭskultadas kun pape seriozaj kapjesadoj. Nur tiel ili povas konservi batalkampon, kie ili povas venki.

Ili ne povas laŭte eldiri, ke ŝtatpovo dependas de ŝtatkulturo, ŝtatinstruado kaj ŝtata kontrolestrado de ĉiuj informofontoj. Kio okazus se ĉiuj civitanoj de ĉiuj ŝtatoj povus sen lingvaj doganoj aliri ĉiujn informfontojn? Kio okazus, ekzemple, se dum la militiro en la Araba Golfo, ĉiuj civitanoj povintus spektadi la televidilojn Irakajn, Iranajn, Usonajn, Alĝeriajn, Franciajn kaj ĉiujn aliajn, simple puŝante kontaktilojn kaj facile komprenante la argumentadojn? Kio okazus, ekzemple, se Silvaniaj lernantoj de mezlernejoj kapablus legi kaj kompari lernolibrojn pri la historio de sia lando, lernolibrojn redaktitajn en Rumanio, Hungario, Germanio kaj Usono? Kio okazus, resume, se ĉiu povus kompari la 'oficialan' veron kun la veroj de ĉiuj?

Kio okazus se studentoj Hindiaj aŭ Togolandaj ne estus devigataj elspezi la plej belajn jarojn de sia juneco por provadi ellernadon de la angla, aŭ de la franca, kiujn lingvojn, cetere ili neniam vere ellernos, ĉar ili ne vivas en la etosoj de angla aŭ de franca kulturoj? Ili ĉiam estos postrestintaj, ĉar la lingva propedeŭtiko forbaras ilin de la fariĝantaj kulturo kaj scienco; ili aliras nur la jam fantajn.

La simpatiaj kaj kleraj ŝtatoficistoj scias kio okazus. Okazus, ke la civitanoj ne subtenus krucmilitirojn kontraŭ diktatoreto por savi alian diktatoreton same fian. Okazus, ke en demokratiaj landoj almenaŭ parto de civitanoj voĉdonadus laŭ siaj bonaj mensoj kaj ne laŭ mensoknedaj amaskomunikiloj.

Okazus, ke Silvanianoj komprenus, ke historie, laŭrajte kaj bonmense ili neniam estis Rumanianoj, Hungarianoj, Germanianoj, sed anoj de miljara kultura unuaĵo, kiu povas esprimiĝi nur per politike nedependa konfederacia ŝtateto, kun kantonoj kulture memstaraj, rumanlingvaj, hungarlingvaj, germanlingvaj. Okazus, ke ili komprenus, ke la teritoria argumento estas falsa, ĉar pluraj kantonoj, pluraj kulturaj memstarecoj povas kunvivi sur la sama tereno, se – kaj jen la vundopunkto – ĉiu havas apud sia kulturlingvo denaska, lingvon tuthoman kaj kulture same valoran, apartenantan al ĉiuj kaj al neniu. Ĉu iu vere supozas, ke seriozaj ŝtatresponsuloj povus enkonduki ĉi tiun tuthoman lingvon en la programojn de lernejoj hungaraj, rumanaj aŭ germanaj? Tio estus la teritoria perdo de Silvanio, triono de Rumanio, duono de Hungario. Rumanio perdus Silvanion kaj Hungario ne gajnus ĝin. La gajnintoj estus la Silvanianoj.[2]

Okazus, ke studentoj de teknologie postrestintaj sed kulture valoregaj landoj ne perdus 10 jarojn de sia vivo por ellerni neellerneblajn fremdajn idiomojn, sed kreus federaciajn universitatojn, en kiuj dum la unua jaro oni ellernus

Esperanton, kiun oni povas vere EL-lerni en unu jaro, kaj poste oni povus libere aliri instruadon de profesoroj, kiuj instruus en ellernita facila lingvo, ne en sia gepatra. Anstataŭ malestimi siajn studentojn ne majstrantajn la instrulingvojn kaj sin esprimantajn en 'nigretulaj' angla aŭ franca, ili alparolus ilin sur 'neŭtrala lingva fundamento'. Okazus, ke Afrikanoj, Hindianoj kaj aliaj, ne plu bezonus la submetiĝemajn kontaktojn kun Francio, Anglio, Rusio aŭ Usono, por siaj instrusistemoj kaj administracioj. En Esperanto ili same bone povus utiligi la sciojn kaj servojn de malgrandaj ŝtatoj, kies politikaj premoj estus proporciaj al iliaj mondpotencaj gravecoj. Okazus, ke la neokolonialismo, la plej grava mondpolitika sistemo de la nuno, kolapsus kaj ke la ŝtatoj kiuj eltiradas profitojn el lingvaj imperialismoj devus alfronti gigantajn malfacilaĵojn. Ĉu iu povas serioze imagi, ke tiuj ŝtatoj apogos Esperanton?

La veraj argumentoj kontraŭ Esperanton? Mi klare eldiru ilin:

– ke ĝi estas facila, belsona, riĉa kaj nuanca;

– ke ĉiu povas ĝin majstri je nivelo bezonata;

– ke ĝi ebligas senperan komunikadon de ĉiu kun ĉiuj;

– ke ĝi ebligas la elementan kaj mezan instruadojn de ĉiu infano en sia gepatra lingvo, estante universitata lingvo tie, kie la malgrandeco de la gepatra malhelpas disvolvigon de universitata sistemo;

– ke ĝi ebligas la liberan interŝanĝadon de ideoj kaj liberigas de nacilingvaj gettoj;

– ke ĝi ebligas nedependadon de la industrioj kaj teknologioj de la ŝtatoj en kies lingvoj funkciadas universitatoj kaj altlernejoj;

– ke ĝi detruas la privilegiojn de socitavoloj, kiuj havas eblecojn ellerni 'grandajn' lingvojn tre malfacilajn;

– ke ĝi malhelpas la mensoknedadojn naciŝtatajn.

– ke oni povas regi nur disigante, kaj Esperanto havas solidarigan rolon.

Mi certe forgesis kelkajn. Sed ne gravas, oni trovos ilin mem. Gravas, ke ni ĉesu la bataladon kontraŭ ventomuelilojn kaj alfrontu niajn malamikojn sur tereno de ni elektita, klare elmetita. Homoj elektu inter nia mondo de memstaraj individuoj kaj ilia mondo de ŝtatoj. Ni ne plu diskutu pri la lingvaj kvalitoj de Esperanto. *Tiuj, kiuj havas la rezonadon pli fortan, kaj kiuj digestadas pli bone siajn pensojn por igi ilin pli klaraj kaj pli intelekteblaj, povas ĉiam pli bone persvadi pri kio ili proponadas, eĉ se ili parolus nur la basbretonan, kaj neniam ellernintus la retorikon*[3]. En 1637a oni jam sciis tion. Ni prefere elpafu la demandojn:

– Kial vi ne volas, ke ĉiu povu komuniki kun ĉiuj?


el la gravurajoj de Gustavo Doré

– Kial vi, kiu scias, ke infanoj, kiuj ne ricevadas elementan kaj mezan instruadojn en siaj gepatraj lingvoj, estos kulture postrestintaj; kial vi ne volas, ke ilin oni instruu en siaj gepatraj lingvoj?

– Kial vi volas, ke la manko de komuna helplingvo malebligu la kreadojn de federaciaj ŝtatostrukturoj pacaj kaj kunhelpaj?

– Kial vi ne volas, ke ĉiuj povu aliri la kulturajn valoraĵojn de ĉiuj etnoj? Ĉu vi timas, ke la viaj perdus el siaj briloj?

– Kial vi kredas, ke vi estus malpli klera se ankaŭ aliaj homoj povus kleriĝi?

... kaj kelkajn aliajn spirite similajn, kiujn vi trovos mem.

La reagoj estos koleraj, perfortaj. Malamikoj demetos la maskojn kaj ekatakos mondialistojn, kosmopolitistojn, anarkiistojn, individualistojn, naciperfidulojn, klasperfidulojn, liberpensulojn kaj ĉiujn aliajn fiulojn, kiujn iliaj febralaj mensoj povas elimagi. Nu bone, ni fakte estas tiaj, sed ne laŭ sencoj, kiujn ili kapablas koncepti.

La forĵeto de la naciŝtataj protezoj de la homa menso estas ja la plej grava afero de la 21a jarcento.

*Eugène de Zilah*

1. Blinkenberg, dana profesoro, kiu dum la ĝenerala konferenco de UNESKO-1954 en Montevideo, Urugvajo, mokeme senrespondece atakis Esperanton (v. *Esperanto en Perspektivo*, p769...)

2. Mi ne diras 'Transilvanio', ĉar por homoj tie loĝantaj, tiu lando ne estas trans la 'silvoj' (arbaroj), sed ene de.

3. Kartezio: *Diskurso pri la metodo*, p1-09.